



NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responda eldonanto :

Lucien BOURGOIS,

25, Rue Gambetta,

62 - NOYELLES-GODAULT, tél. : 59

Kotizoj (kun bultenservo) :

a) Junuloj : 2 F.

b) Aktiva membreco : 3 F.

c) Subtenanto : 5 F.

Fédération Espérantiste du Nord de la France

17, Rue des Bouvreuils, 62 - ARRAS.

C.C.P. LILLE 517-15.

Ĝenerala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, 62 - CALAIS.

Informilo n-ro 1

Januaro-Februaro 1966

Federacia Renkontiĝo - MERICOURT - 27/3/66

Estimataj Federacianoj,

La NFEF elkore invitas vin honori per ĉeesto ĝian printempan renkontiĝon, kiu traokazos en Méricourt, la 27-an de Marto, laŭ la jena provizora programo :

Rendevuejo : ĉe Medicin-Sociala Centro (Centre Médico-Social : rue Michelet, en Méricourt).

de la 10-a ĝis la 12-a : liberaj konversacioj.

je la 12-a, ĉe la urbodomo : oficiala akcepto kaj honorvino.

Je la 13-a, ĉe "Kafejo HERMANT", rue Pasteur : Kunmanĝo.

Prezo : 9 F, inkluzive de la trinkaĵoj.

de la 15-a ĝis la 17-a, en la urba salono "Salle Municipale",

Place de la Mairie : Kultura kaj distra kunsido.

Neniu partoprenonto hezitu kunporti utiligeblan materialon!

Por la kunmanĝo, oni nepre sin anoncu antaŭ la 25-a de marto al :

- S-ino Van PARIS, 83, Cité des Cerisiers, 62 - Méricourt.

BONVENON al ĉiuj en Méricourt!

Ges-rcj Van PARYS.

Kalendaro de la ĉefaj Esperanto-Eventoj en la jaro 1966-a :

-
- 27/3/66 : Printempa renkontiĝo de N.F.E.F. en Méricourt.
1/4 ĝis 8/4/66 : 5-a Paska Kultura Semajno en la Kastelo Grésillon.
Informojn havigas : S-ro BABIN, Lycée Pierre-Loti,
5, Boulevard Buisson, 17 - ROCHEFORT-sur-MER.
- 8/5/66 : Jara Kongreso de la Esperanto-Federacio
"Languedoc-Roussillon", en MONTPELLIER.
(komunikis) : "SUDFRANCA STELO", 5, Quai Vauban, 66 - PERPIGNAN.
- 27/5 ĝis 30/5/66 : 50-a Brita Esperanto-Kongreso en NORWICH
(Graflando Norfolk - Orienta Anglujo).
Aliĝiloj - senpagaj por eksterlandanoj - estas havigeblaj de la sekretariino
de la L.K.K. ĉe : 50-a Brita Esperanto-Kongreso,
5, Rolleston Close, NORWICH - Anglujo.
- 28/5 ĝis 30/5/66 : 58-a Nacia UFE-Kongreso en AGEN.
Informas : S-ro RIBOT, 11, rue Paul-Vergnes, 47 - MARMANDE.
- 30/7 ĝis 8/8/66 : 51-a U.K. de Esperanto, en BUDAPEŝTO.
U.F.E. aranĝos aŭtobusan karavanon.
Oni petu tiurilatajn detalojn de : U.F.E. , 34, Rue de Chabrol, PARIS (10°).

MARKOLA KONGRESO - KOMUNIKO :

Niaj britaj konfederacianoj sciigis ke, pro diversaj cirkonstancoj, al ili estos neeble aranĝi la ĉijaran Markolan Kongreson en FOLKESTONO.

Sekve, la proksima Markola Kongreso tre espereble povos okazi en Kalezo venontan jaron.

SERIOZA INVITO AL POLLANDO :
(La legantoj bonvolu laŭeble diskonigi kiel eble plej vaste).

Instruistino en pola Pedagogia Liceo ege deziras viziti Francujon venontjare en somero (julio-aŭgusto).

Ŝi - altinstruita sinjorino - havas ĉ. 60 jarojn kaj kiel sperta, longjara instruistino estas bone salajrata.

Ŝi estas tre vigla k bonhumora virino, bone scianta la francan.

Ŝi estas preta bone kaj kore gastigi en sia hejmo kaj en Pollando unu francan instruistinon, kiu deziras reciproke viziti Pollandon kaj reciproke gastigi ŝin en Francujo.

La Kandidatino povas skribi franclingve rekte al ŝi je la adreso :

S-ino Profesorino Maria NIKOSIEWICZ, ul. Swierczewskiego 27,
WROCLAW (Pollando).

NIA VIVO :

BREMES-les-ARDRES (P.-de-C.) - Kun bedaŭro, ni eksciis, ke nia simpatia membro, S-ro SKOLE, decidis rezigni pri la vizonbredado kaj rehejmiĝi al Danlando kun sia edzino.

Intima adiaŭa renkontiĝo okazis, dimanĉon 19-an de septembro 1965, en ĉeesto de la komitatanoj de "Centre Culturel Calaisien Esperanto".

Al niaj karaj gastamaj geamikoj, ni deziras longan k feliĉan vivon.

CALAIS - Sukcesoj : "Nord-Littoral" (4/2/66) raportas pri la sukcesoj ĉe la "Atesto pri Lernado" en LILLE kaj ĉe "Supera Atesto" en Grésillon, lastjare, de F-ino Danielle CLUZET, el Calais, membrino de "Centre Culturel Calaisien Esperanto".

N.F.E.F. kuniĝas kun la marregiona ĵurnalo por esprimi al ŝi sian varman gratulon.

Tio ĉi interesas viajn eksterlandajn korespondantojn!

ROUBAIX - Turisma prospekto : En jaro 1965-a, la turismoficejo de Roubaix, "Les Amis de Roubaix", eldonis faldprospekton kun plurlingva resumo, inkluzive de Esperanto.

Adreso : "Les Amis de Roubaix", Boulevard du Général-Leclerc, 59 - ROUBAIX.

Instruado :

ARRAS - Komence de decembro 1965, S-ro Georges ODENT malfermis kurson por komencantoj ĉe la Porinstruista Seminario.

Kurslibro : "Initiation théorique et pratique à la langue internationale Esperanto", de D-ro Pol DENOËL.

Nunjare oficiale ekzistas Esperanto-Rondo en la kadro de "Foyer des Normaliens" (Hejmo de la Seminarianoj).

VALENCIENNES : Kun permeso de la lerneja Inspektoro k konsento de la gepatroj de la lernantinoj, S-ino LIGOT instruas Esperanton al 24 knabinoj.

Statistiko pri Esperanto-kursoj en lernejoj (1965/1966) :

Internacia Ligo de Esperantistaj instruistoj bezonas kompletajn informojn pri la aktuala Esperanto-instruado en lernejoj.

Bonvolu rilati kun S-ro Olle OLSSON, Bantorget 3,
LUND (Svedlando).

NEKROLOGO :

ARRAS : La 10-an de decembro 1965, ĉe la tombejo en Arras, kelkaj amikoj deponis florojn sur la tombon de S-ro Jean DELEURY, nia bedaŭrata membro.

Dum tiu kortuŝa ceremonio, S-ro PHILIPPE reprezentis la federacion.

Ni bonvenigas jenajn novajn membrojn :

S-ino de LOUSTAL	66, Rue de Ponthieu, PARIS (8°).
S-ro CHAMPSEIX M.	33- FRONSAC.
S-ro GAILLOT A.	13, Rue de la Source, 60 - CHANTILLY.
S-ro DECROUY G.	Rue du Docteur Schweitzer, 60 - VINEUIL-ST-FIRMIN.
S-ro FISCH	9, Rue du Quesnoy, 59 - QUIEVRECHAIN.
S-ro ROBTON P.	130, Rue Joseph-Bouliez, 59 - SOMAIN.
F-ino SERRASO	33, Rue Despinoy, 59 - VALENCIENNES.
F-ino HARDELIN Yolande	38, Rue E.-Zola, 59 - THIAN.
S-ino SWYNGHEDAUV G.	4/26, Rue de la République, 62 - ST-POL-sur-MER.
S-ro LEMAIRE R.	(adreso nekonata, bv. informi la redakcion).

Adresŝanĝoj :

S-ro DIEUSART Gaston, antaŭe en La MADELEINE, loĝas nun
28, Rue Blondel, 92 - COURBEVOIE.

S-ro BOURBOIS Albert, antaŭe en Hénin-Liétard, loĝas nun
133, rue du Général-de-Gaulle, 59 - La NEUVILLE.

LA GAZETARO KAJ NI :

Nord-Littoral (11/1/66) - Iniciale de la agema "Centre Culturel Calaisien Esperanto" aperis varbartikolo pri Esperanto.

Nord-Littoral (28/1/66 - De sub la plumo de S-ro A. FERMON aperis interesa apelo favore al Esperanto kun la starigita demando :

"KION ONI EFEKTIVE FARAS POR TIU ĈI NEPRE NECESA PROGRESO?"

Ĝi mencias la antaŭparolon de dokumento eldonita de "Centro de Esploro k Dokumentado".

Télé 7 Jours (7/12/65 sciigis, ke la komedio "La Petite Hutte" de Andreo ROUSSIN, prezentita ĉe la unua ĉeno jam estis ludita en Esperanto.

TELEVIDO :

Kunlabore kun S-ano Jack ROUSSEAU, Jacqueline CAURAT preparis sekvencon de sia fama rubriko "Telefilatelio" kun la titolo "Esperanto kaj Filatelio". Ĝi verŝajne estas aperinta sur la "Ekraneto" la 11-an de Februaro.

S-ro ROUSSEAU redaktas la Esperantan rubrikon en la faka revuo "Le Monde des Philatélistes".

Ĉina filmo : Kolorita Esperantlingva parolfilmo estas pruntebla. Daŭro : unu horo. Interesataj grupoj sin turnu al :

U.F.E., 34, Rue de Chabrol, PARIS (X°).

Aŭtomobilistoj : Speciala bendo surskribita "Esperanto, Lingvo Internacia" estas senpage havebla.

Skribu al : D-ro G. MAILLARD,
14, Rue Ravon, 92 - BOURG-la-REINE.

IV.- VOLAPUKO.

Inter la 2-a k la 3-a grupo viciĝas sistemo de universala lingvo, kiu meritas apartan mencion, nome : Volapuko, kiun verkis Germano : Johan-Martino SCHLEYER (1831-1912), katolika pastro en bavara vilaĝeto.

Mallonge, jen la ĉeftraĵoj de Volapuko (el la anglaj vortoj "world" = mondo k "speak" = paroli).

Ĝi estis kreita en 1879 k rikoltis gravan sukceson en Eŭropo, antaŭ la naskiĝo de Esperanto.

La plej brila fazo de Volapuko situas inter la jaroj 1881 k 1889. Ĝi konsistigis la unuan vastskalan eksperimenton. Ĝi disfamiĝis, elmontrante la eblecon praktike uzi helplingvon por la internaciaj rilatoj.

Unue, en 1878, SCHLEYER verkis sistemon de universala alfabeto tute taŭgan por fonetike transskribi ĉiujn sonojn uzatajn en la diversaj lingvoj. Kuraĝigita pro la sukceso de tiu alfabeto en la koncernaj medioj, SCHLEYER tiam revis konstrui artefaritan lingvon. Por tio, li unue intencis starigi sian sistemon sur la bazoj de la ĉefaj eŭropaj lingvoj, nome : germana, angla, itala, hispana k rusa (bazoj sur kiuj poste estis rekomencotaj k daŭrigotaj la provoj por la solvado de la helplingva problemo).

Tamen, li baldaŭ rezignis pri tiu unua ideo. Li klopodis por konstrui lingvon bazitan sur absolute regula k racia gramatiko.

Elstara k rimarkinda lingvisto (li scipovis ĉirkaŭ 40 lingvojn), SCHLEYER koncentris en sia verkado ĉiujn faktojn k ideojn de la multaj antaŭaj projektoj. Lia lingvo entenas la solvon de tre diversaj problemoj, interalie la fonetika alfabeto, jam menciita, kiun li enkorpiĝis en Volapukon.

La gramatiko de Volapuko estis simpla k facila. Ĉiuj substantivoj deklinaciĝis laŭ ununura regulo. La pluralo formiĝis per almeto de la litero "s". La in-genro estis signita per prefikso, la adjektivo k la komparativo per karakteriza sufikso. La numeraloj fundamentaj fariĝis ordaj, onaj aŭ transformiĝis kiel adverboj per afiksoj. Ĉiuj verboj konjugaciĝis laŭ unu sama regulo; prefikso signis la tempformon.

Mi amas	:	<u>Löfob</u>	Stimob	:	Mi honoras
Ci "	:	<u>Löfol</u>	Stimol	:	Ci "
Li "	:	<u>Löfom</u>	Stimom	:	Li "
Ŝi "	:	<u>Löfof</u>	Stimof	:	Ŝi "
Ni "	:	<u>Löfobs</u>	Stimobs	:	Ni "
Vi "	:	<u>Löfols</u>	Stimols	:	Vi "
Ili "	:	<u>Löfoms</u> (virsekso)	Stimoms	:	Ili " (virsekso)
Ili "	:	<u>Löfofs</u> (in-sekso)	Stimofs	:	Ili " (in-sekso)

Videble, la 4 lastaj formoj estas identaj kun la 4 unuaj. Nur diferencigas ilin la almeto de la litero "s", signanta la pluralon.

La fundamenta vortprovizo konsistis grandparte el radikoj apartenantaj al la angla lingvo k, iagrade, el elementoj pruntitaj al la lingvoj latina, germana k franca.

Tiel, el la latina devenis :

dol (dol/or) doloro	pop (pop/ulus) popolo
nim (a/nim/a) animalo	stel (stel/a) stelo

La germana formis :

vun (Wun/de) vundo	fad (Fad/en) fadeno
bel (Ber/g) monto	nef (Nef/fe) nevo

El la angla estis ĉerpitaj :

nol (k/nowl/edge) scio	plim (com/plim/ent) komplimento
yel (year) jaro	tim (tim/e) tempo

En 1880 aperis, germanlingve, la unua volapuka studlibro; poste, en 1882, estis fondita, en Vurtembergo, la unua societo por studo de tiu lingvo.

La bezono de helplingvo montriĝis urĝa. Rapide, Volapuko disvastiĝis en Germanujo, Ruslando, Francujo k ĉefe en Nederlando.

Profesoro A. KERCKHOFFS organizis la Francan Societon k eldonis grandan propagand-gazeton.

La unua Universala Kongreso de Volapuko okazis la 26-an k 27-an de aŭgusto 1884 en Frederikhaveno (Germanujo). Ankaŭ en Germanujo, en Munkeno, sidis la dua, de la 6-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1887.

La du jarojn antaŭe fondita Volapuk-Akademio aranĝis la 3-an kongreson, kiu havis lokon en Parizo en 1889. Partoprenis proksimume 200 volapukistoj, la plej elstaraj reprezentantoj de la movado.

Dum la 1-a k 2-a kongresoj, la diskutoj k raportoj okazis germanlingve sed, dum la Pariza Kongreso, oni parolis k diskutis nur volapuke. Tio konsistigis aŭdacan k kuraĝan iniciaton. Ĝi sensaciis. La uzado de Volapuko trafe k nediskuteble elmontris, ke la homo perfekte kapablas komprenigi sin, esprimi siajn ideojn k sentojn per artefarita lingvo, kiun kreis lia genio.

SCHLEYER estis superfavorata per honoraĵoj k rekompencita de la Papo, kiu nomis lin Ĉefĉambelano.

1889 vidas la apogeon de la volapukista movado. Pli ol 300 societoj, pli ol 1.000 diplomitaj profesoroj, 384 diverslingvaj stud- aŭ propagand-libroj, 58 gazetoj, instruado en kelkaj eŭropaj altlernejoj (Parizo, Vieno, Bordezo, Madrido, kelkaj en Italujo) en Sud-Ameriko k Nord-Ameriko, tiele disfloris Volapuko en la stadio de ĝia kulmina furoro.

(sekvota)

Claude VERNAY. Elfrancisigis : Lucien BOURGOIS.

Bulteno ofsete presita de :

Centre National Espéranto-Office, 9 Bis, Rue du Commandant-de-Poli, ORLÉANS.

Le Gérant Responsable :

Lucien BOURGOIS, 25, Rue Gambetta, 62 - NOYELLES-GODAULT.